MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO
http://www.esperanto-mexico.org/

LABORRAPORTO DE LA ESTRARO DE MEKSIKA ESPERANTO-FEDERACIO KAJ RAPORTO PRI ESPERANTO EN MEKSIKO JANUARO – DECEMBRO 2009[1]

ENKONDUKO

Tiu ĉi dokumento estas la laborraporto de la MEF-estraro sed en ĝi ankaŭ troviĝas informoj pri diversaj agadoj de la ĝenerala publiko kaj de pluraj esperantistoj. Per tiu ĉi verko oni havos ĝeneralan superrigardon pri la celoj, aktivecoj kaj rezultoj de la meksika Esperanto-movado dum 2009.

En junio 2009, por la ĝenerala asembleo okazinta en la Jura Fakultato de la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko (UNAM), ni prezentis la laborraporton por la tempo inter majo 2008 kaj junio 2009 ĉar tiu estis nia unua estrar-periodo. Tamen pro praktikaj kialoj nun la estraro decidis prezenti la laborraporton por la kompleta jaro 2009. Tial en tiu ĉi teksto vi trovos koncizajn informojn, kiuj ankaŭ troviĝis en la lasta laborraporto de MEF.

Laŭ la laborplano de MEF (2008-2012), la plej gravaj laborkampoj estas; informado, instruado / klerigado kaj utiligado, pro tio ĉi tie ni traktos ilin.

1. INFORMADO

Ni konscias pri la graveco daŭre kaj senĉese informi pri Esperanto, ĝia movado kaj evoluo. Tiaj agadoj estis faritaj je diversaj kampoj kiel la retpaĝo, ekspozicioj, standoj / flugfolioj, afiŝoj, informprelegoj, gazetaro kaj radio.

A) Retpaĝo

Unu el la plej gravaj taskoj dum la jaro estis la daŭra zorgo de la MEF-a retpaĝo (Bildo 1) ĉar per ĝi ni informas esperantistojn kaj interesitojn pri la Internacia Lingvo je diversaj kampoj, ekz., historio, kursoj, renkontiĝoj naciaj kaj internaciaj, Pasporta Servo, lokaj kontaktoj, ktp. Tiel pluraj personoj havas la eblon informiĝi senprobleme kaj sen investoj pri la movado kaj pri lerneblecoj.

Rilate al la teknika prizorgado daŭre kontribuis Boris Legault, Martin Schäffer kaj Raúl Angüiano, MEF-membroj. Dum la jaro ĉefe Mallely Martínez atentis pri la verkado kaj publikado de artikoloj kaj novaĵoj, krome kontribuis per artikoloj; Morayma Martínez, David López kaj Daniel Moreno, estraranoj de MEF kaj la daŭra helpanto de la asocio Martin Schäffer. Aliaj helpantoj en la

[1] Tiu ĉi dokumento estis verkita de Mallely Martínez, prezidantino de Meksika Esperanto Federacio, kontrolita kaj aprobita de la sekvaj MEF-estraranoj: Daniel Moreno, ĝenerala sekretario, Morayma Martínez, kasistino, David López, membro kaj Martha Cárdenas, membro.

verkado de la paĝo estis; Denice Maldonado, Gilda Muñoz kaj la gvidantoj de la klubo en GDL, Ulises Franco, Sara González kaj Edgar López.

En la retpaĝo aperis en 2008 listo de lokaj kontaktoj de 20 meksikaj urboj, kiuj donas al interesitoj, naciaj kaj eksterlandaj esperantistoj ŝancon kontakti aliajn E-lokulojn, dum 2009 la kvanto altiĝis havante lokajn kontaktojn en 26 meksikaj urboj. La koncernaj mesaĝoj samtempe iris al la estraro de MEF, tiel ni ekscias pri kontaktpetoj kaj povas reagi en la kazo ke la loka kontakto ne havas la eblon. Venis plej da informpetoj en 2009 al la sekvaj urboj: ĉefurbo de Meksiko, Guadalajara kaj Monterrey.

Bildo 1. Esperanta versio de la retpaĝo de MEF, “Aktualaĵoj”

Dum 2009 en la retpaĝo ni metis turismajn informojn, hispane kaj esperante, de tri urboj: Guanajuato, San Luis Potosí kaj Oaxaca kun la celo ne nur informi al la esperanta publiko pri tio sed ankaŭ rimarkigi la ne-esperantistojn ke la informoj estas en “alia nekonata lingvo” kaj tiel veki la scivolemon de la vizitantoj (Tabulo 1).

Tabulo 1. Ekzemplo de turismaj informoj publikitaj en la MEF-retpaĝo.

Esperanto	Español
Guanajuato La nomo “Guanajuato” venas el la purepeĉa lingvo kaj signifas “loko aŭ monteto de ranoj”, ĝi troviĝas en la centro de la lando, ĉe 430 km for de la ĉefurbo de Meksiko. Guanajuato estas mina, bela urbo, “Juvelo de Ameriko”, ĝia famo kaj riĉeco estas danke al la eltrovo de riĉaj vejnoj de arĝento kaj oro. Dum la prahistorio en la regiono loĝis la ĉiĉimekoj, “los chichimecas”....	**Guanajuato** El nombre “Guanajuato” viene del purepecha y que significa “lugar o cerro de ranas”, la ciudad se encuentra en el centro del país, aprox. a 430 km. de la ciudad de México. Guanajuato es una hermosa ciudad minera, Joya de América, que debe su fama y su fortuna al descubrimiento de ricas vetas de oro y plata. En la época prehispánica la región estuvo habitada por los Chichimecas...

B) Informagadoj: ekspozicioj, standoj / flugfolioj, afiŝoj

En 2009 okazis diversaj informagadoj en la lando. Jam ekde 2008 la MEF-estraro prezentis novan informilon, kiu presiĝis en eldonkvanto de 10,000 ekzempleroj, en julio 2009 tiu kvanto elĉerpiĝis kaj ni denove mendis aliajn 10,000. Esperanto-agantoj el pluraj urboj de la lando daŭre helpadas en la informa agado disdonante la menciitajn flugfoliojn.

Fine de januaro MEF partoprenis per informstando ĉe la loka “Monda Socia Forumo” en la ĉefurbo de Meksiko. Samtempa kaj simila stando okazis en Aguascalientes danke al José Luis Gutiérrez Lozano, komitatano de la MSF kaj Esperanto-lernanto. Aliflanke en la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko (UNAM) ni pendigis afiŝojn pri la okazintaj kursoj kaj pri la 10ª Meksika Esperanto Kongreso, kiu estis en ĝia Jura Fakultato.

Inter la 9ª kaj 11ª de septembro Daniel Moreno, Mallely Martínez, David López kaj Martha Cárdenas, estraranoj de MEF, kune kun Martin Schäffer kaj Neil Blonstein (Foto 1) partoprenis, kiel reprezentantoj de UEA antaŭ Unuiĝintaj Nacioj, en la 62ª Konferenco de Neregistaraj Organizoj okazinta en la ĉefurbo de Meksiko. La meksika teamo de UEA distribuis diversajn informfoliojn pri Esperanto kiel ekzemple "La pozicio de UEA pri lingvaj rajtoj", "Praga Manifesto" kaj ĝeneralaj informoj, ankaŭ la reprezentantoj havis interparolojn kun aliaj delegitoj, multaj volontuloj de la konferenco kaj kun lokaj ĵurnalistoj. Pri tiu ĉi agado estas artikolo publikita en la novembra numero de la revuo “Esperanto” (Bildo 2).

Foto 1. MEF-estraranoj, Martin Schäffer kaj Neil Blonstein dum la 62ª Konferenco de NRO.

Bildo 2. Kovrilo revuo “Esperanto”

En Meksiko, kiel en multaj aliaj landoj, la 15an de decembro en la retserĉilo “Google”, aperis la Esperanta flago motive de la 150ª datreveno de Dro. Zamenhof (Bildo 3). Tiu publikaĵo okazigis tion ke pluraj homoj vizitis la MEFretpaĝon kaj skribis al la estraro demandante pri la Internacia Lingvo.



Bildo 3. Ĉefa paĝo de Google-México, la 15an de decembro 2009

C. Informprelegoj

Foto 2. Gilda Muñoz partoprenante kongresojn en UABC

Luis Córdova Arellano kune kun kelkaj estraranoj kaj helpantoj de MEF dufoje aranĝis informprelegon pri Esperanto kun la celo inviti homojn al la kursoj. Multaj studentoj vizitis la prelegojn. Simila informprelego okazis je la komenco de la jaro en la Universitato Aŭtonoma de Chapingo, Texcoco, kie Mallely Martínez poste ofertis sabatan kurson.

En septembro Gilda Muñoz (Foto 2) partoprenis prelegante pri Esperanto en Lingvaj Kongresoj organizitaj de la Universitato Aŭtonoma de Baja California (UABC), kiu troviĝas nordokcidente de la lando. La rezulto pri tiu partopreno estis tre bona, ne nur ĉar Gilda informis pri la reala uzo de Esperanto internacie, sed ankaŭ ĉar ŝi montris aliajn pozitivaĵojn: ĝian propedeŭtikan valoron, la enkondukon al plurlingvismo per ĝia lernado, la alproksimigon al diversaj kulturoj per ĝia uzo, ktp. Kiel plej grava atingo de tiu ĉi agado estas ke ekde somero 2010 Esperanto estas parto de la “oficialaj lingvoj” instruataj en tiu Universitato kiel libere elektebla fako.

En oktobro Mallely Martínez, Daniel Moreno, Morayma Martínez kaj Martin Schäffer organizis prezentadon pri Esperanto por la kongrespartoprenantoj de la 6ª Monda Scienc-Junulara Kongreso en Meksikurbo, pli precize en la Jura Fakultato de la UNAM. La unua parto konsistis en mallonga ekspozicio pri la lingvo Esperanto, la historio, la celo, la Pasporta Servo, la diversaj kongresoj, la tradukitaj kaj originalaj verkoj, la esperantaj revuoj, ktp., kaj la dua en projektado de kelkaj partoj de la filmo “Esperanto estas...”. Gravas mencii ke ni estis invitataj de eks Esperanto-lernanto de Daniel Moreno ĉe UNAM.

D. Gazetaro

Interne, MEF eldonis en 2009 du numerojn (bildoj 4 kaj 5) de ĝia bulteno “NI ĈIUJ”, kies ĉefaj temoj estis:

1) “*La graveco de la renkontiĝoj kaj la parola praktikado de la lingvo*”, en kiuj kontribuis enhave: Salvador Chacón, Luis Del Valle, Fidel Figueroa, David López, Mallely Martínez kaj Milan Sveda.
2) “*Internaciaj renkontiĝoj: konstanta fonto de energio por la Esperantistaro*”, en kiu kontribuis enhave: Sofía Carbot, Jean Codjo, Johan Derks, Fidel Figueroa, David López, Alberto Montero, Michael Porter, Martin Schäffer, Milan Sveda kaj Lu Wunsch-Rolshoven.

Bildo 4. Kovrilo de “NI ĈIUJ” 1-2009.



Bildo 5. Kovrilo de “NI ĈIUJ” 2-2009.

Rilate al la ekstera gazetara informado, je la komenco de la jaro laboristoj de la loka ĵurnalo “Zócalo Saltillo” informis pri la instruado de Luis Córdova en la urbo Saltillo per artikolo nomata; “Esperanto, un idioma alterno” (Esperanto, alterna lingvo).

Guillermo Macías y Díaz Infante sukcesis, en januaro kaj decembro 2009, aperigi dulingvajn artikolojn nomatajn “El Esperanto es más que un idioma” (Esperanto estas pli ol lingvo) kaj “El Esperanto abre las murallas de Nördlingen para los cuentos y leyendas del mundo” (Esperanto malfermas la muregojn de Nördlingen por la rakontoj kaj legendoj de la mondo) en la ĵurnalo “La Jornada de Aguascalientes”.

Ankaŭ je la lasta monato de 2009, Raúl Olvera Mijares publikis en: “La Jornada Semanal” artikolon nomatan “El Esperanto”, pri tiu ĉi lasta verkisto ni ne scias kaj plej eble li ne estas esperantisto (Bildo 6).

Bildo 6. Tiu ĉi akompanas la artikolon “El Esperanto” verkita de Olvera.

E. Radio / Televido

En Tijuana dum 2009 de tempo al tempo oni parolis pri Esperanto en Radio Tecnológico 88,7 FM danke al la kunlaboro de Sro. Jesús Cueva Pelayo kaj Gilda Muñoz. Okaze de vizito de Luis Córdova Arellano al Saltillo je la 20.01.2009 loka televidstacio intervjuis lin. Aliflanke dum “la Monda Socia Forumo, México 2009”, en januaro 2009, filmteamo de Televido "TeleSur" el Venezuelo, intervjuis al la prezidantino de MEF, Mallely Martínez, demandante pri la stato de la lingvo monde kaj pri la erara ideo, kiun havas pluraj homoj pri la celo de Esperanto en la senco de anstataŭo de la angla.

2. INSTRUADO / KLERIGADO

Inter januaro kaj decembro 2009 ni ricevis informojn pri entute 15 kursoj (Tabulo 2). Bedaŭrinde ne estas tute klare kiom da personoj komencis la kursojn kaj kiom finis kaj atingis “iun” nivelon.

Tabulo 2. Ĉeestantaj kursoj de Esperanto dum 2009 en Meksiko.

#	Dato	Institucio / Instruloko	Urbo	Instruist(in)o
1	Jan	Intensa kurso en la Ĥemia Fakultato de UNAM	Ĉefurbo	Daniel Moreno
2	Jan	Kurso, Instituto Othli	Saltillo	Luis Córdova
3	Jan – feb	Kurso, Aŭtonoma Universitato Chapingo	Texcoco	Mallely Martínez
4	Jan – maj	Sendependa kurso por infanoj	Tecámac	Mallely Martínez
5	Jan – dec	Kurso, “Asociación de Jubilados y Pensionados del Poder Judicial Federal, A.C.”	Ĉefurbo	Sofia Carbot
6	Jan – jun	Kurso en Kultura Centro “Jaime Torres Bodet”	Nezahualcóyotl	Milton Hernández
7	Feb – jun	Kurso, Jura Fakultato, UNAM	Ĉefurbo	Daniel Moreno
8	Mar – dec	Kurso, Guardería Cuauhtémoc	Guadalajara	Kati Brownshire / Sara González
9	Apr – jun	Kurso en la Ĥemia Fakultato de UNAM	Ĉefurbo	Daniel Moreno
10	Maj – ?	Kurso, “Kulturdomo de Tijuana”	Tijuana	Gilda Muñoz
11	Junio	Intensa kurso en la Jura Fakultato de UNAM antaŭ la 10ª Meksika Kongreso	Ĉefurbo	Mallely kaj Morayma Martínez, Daniel Moreno
12	Junio - Julio	Intensa Kurso en la Ĥemia Fakultato de UNAM (Foto 3)	Ĉefurbo	Daniel Moreno
13	sept - nov	Kurso, “Tecnológico de Monterrey”	Ĉefurbo	Alberto Montero
14	Sept - dic	Kurso, *Centro de Información e Investigación Histórica de Acapulco (CIIHA)*	Acapulco	Luis Raudón
15	Oktobro	Intensa kurso en la Jura Fakultato de UNAM dum la 6a Monda Scienc-Junulara Kongreso	Ĉefurbo	Daniel Moreno helpe de Mallely Martínez.

Ĵus antaŭ la 10ª Meksika Esperanto Kongreso de Esperanto, en junio 2009, okazis seminario por aktivuloj, ĝi estis gvidata de Maritza Gutiérrez González kaj Martin Schäffer, bedaŭrinde pro la ne feria periodo malmultaj partoprenis, tamen ni povas diri ke, ekz. en Guadalajara Kati Brownshire dum la tuta 2009 efike aktivis kaj certe uzis la konojn, kiujn ŝi akiris dum tiu ĉi evento.


Foto 3. Gelernantoj de Daniel Moreno dum somera kurso en la Ĥemia Fakultato de UNAM.

Daŭre relative multaj meksikanoj lernas Esperanton per plej diversaj retkursoj. Plej ofte la homoj uzas Lernu.net, la brazilan kurson “Curso de Esperanto” kaj la kurson de Alejandro Mejia “Esperanto en 10 lecciones” ĉe jubilo.ca. Enrique Ellemberg, Martin Schäffer, Mallely Martínez kaj Morayma Martínez instruas al kelkaj hispanparolantoj per la reto. Martin Schaeffer estas lingvohelpanto ĉe Lernu.

Post la partopreno de Gilda Muñoz en Lingvaj

Kongresoj okazintaj en la UABC, lastan septembron, nia plej aktiva esperantistino en Tijuana, Baja California havis seriozan babiladon kun la direktoro de tiu Universitato kun la celo instrui oficiale Esperanton en la UABC, la reago de la estro estis bona kaj malferma al tiu propono kaj en novembro 2009 ni prezentis instruprogramon nomatan: “Esperanto: lengua y cultura”, kiun faris Gilda Muñoz kune kun Mallely Martínez kaj kontrolis Daniel Moreno kaj Atilio Orellana.

Por la estonto tre gravas formi novajn instruistojn kaj havi ekzamenan sistemon. Ni forte esperas ke kelkaj meksikaj Esperanto-parolantoj ekzameniĝos baldaŭ. Nur se ni solvos tiun problemon, la Esperantistaro de Meksiko povas kreski pli rapide kaj estos bazo por pli grandskala Esperanto-instruado en meksikaj lernejoj.

3. UTILIGADO

Gravas mencii ke unu el niaj celoj por 2009 estis instigi la homojn partopreni la internaciajn eventojn en Kubo, tial dum ĉiu renkontiĝo ni informadis la partoprenintojn pri tiu grava evento disdonante la unuan bultenon, informante pri kostoj de aliĝoj kaj flugoj kaj ĝenerale pri la organizo kaj aktivecoj de tiaj kongresoj.

Rilate al la Esperanto-grupetoj en 2009 ekzistis en Toluca, Tijuana, Tecámac, Monterrey, Guadalajara, Meksikurbo, Oaxaca kaj Chihuahua, tiu ĉi lasta sen konfirmo. Renkontiĝoj parte estis malregulaj. Laŭ nia scio, la plej oftaj renkontiĝoj estis en Guadalajara kaj en la urbo de Meksiko, gravas mencii la bonan organizon kaj entuziasmon de esperantistoj el Guadalajara ĉar dum la lasta duonjaro ili okazigis 18 semajnajn renkontiĝojn. En kelkaj aliaj lokoj okazas personaj renkontiĝoj inter lernantoj aŭ uzantoj de Esperanto.

Aliflanke Meksika Esperanto Federacio kun lokaj esperantistoj okazigis 3 semajnfinajn renkontiĝojn dum la jaro en 3 urboj lokiĝitaj, inter ili, tute malproksime;

1) Je la 28.02 / 01.03.09 okazis semajnfina renkontiĝo en Guadalajara (Foto 4), danke al la lokaj organizantoj Sara Gonzalez kaj Kati Brownshire. Entute 18 personoj partoprenis la renkontiĝon kaj ĝuis la tempon. La celo estis plifortigi la tiean grupon.

2) Jam en aprilo, la 18an kaj 19an, okazis renkontiĝo en alia parto de la lando. La renkontiĝo en Monterrey (Foto 5) unuigis 17 personojn en du diversaj tagoj. La surlokaj ĉeforganizantoj estis Denice Maldonado kaj la edzo Mario Santibañez, kiuj ne nur tre afable kaj bone organizis, sed ankaŭ gastis al 4 eksterurbaj Esperanto-parolantoj.

3) Preskaŭ je la fino de la jaro, la 29an kaj 30an de novembro, okazis la lasta tia renkontiĝo de la jaro, tiu ĉi fojo estis en Toluca, Estado de México (Foto 6). Ĝin partoprenis 23 personoj el tri provincoj de la lando; Estado de México, Distrito Federal kaj Morelos.

Foto 4. 4ª Semajnfina Renkontiĝo Esperantista en Guadalajara, Jalisco.

Foto 5. 5ª Semajnfina Renkontiĝo Esperantista en Monterrey, Nuevo León.

Foto 6. 6ª Semajnfina Renkontiĝo Esperantista en Toluca, Estado de México.

En la Jura Fakultato de la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko (UNAM), la plej grava de la lando, sukcese okazis inter la 18ª kaj 21ª de junio la 10ª Meksika Esperanto Kongreso, kies ĉefa temo estis; “Lingvistika Diverseco en Meksiko: Fundamenta Parto de ĝia Kulturo”, ĝin partoprenis 58 esperantistoj el 5 landoj; Germanio, Hispanio, Kubo, Meksiko kaj Usono (Foto 7).

La kongreso eblis danke al la apogo de universatatestroj de la Jura Fakultato, de eksteraj prelegantoj kaj, kompreneble, de pluraj samideanoj.

Foto 7. Manĝo post la fermo de la 10ª MEK okazinta en la Jura Fakultato de UNAM.

La tutan raporton kaj fotojn, pri tiu ĉi okazaĵo oni povas legi ĉe http://www.esperanto-mexico.org/files/kongresraporto10aMEK.pdf

Kelkaj meksikaj Esperantistoj en 2009 partoprenis kongresojn ekster la lando; gravas mencii la partoprenon de tiuj, kiuj daŭre aktivas en la movado lande kaj kiuj prenas de tiaj renkontiĝoj novajn fortojn, energion, spertojn kaj konojn ekz. Tiu estas la kazo de Gabriel Jiménez, Mallely kaj Morayma Martínez, Daniel Moreno kaj Martin Schäffer.

4. MEMBRARO

Dum 2009 la membroevoluo estis pozitiva ĉar en 2008 entute estis 56 membroj kaj en la sekvonta ni atingis 103 aktivajn membrojn, tial Meksika Esperanto Federacio por la periodo 2010-2013 havas komitatanon A ene de la Universala Esperanto Asocio.

Meksiko, la 27an de aŭgusto 2010.